



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 218

Junio 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

LABORKUNSIDO ESPERANTA ĈE LA HEREDAĴA FOIRO

La 7-an de majo, 2004, por la oka jaro, la Lernejestraro de Ŝignekto-Centra Regiono en Nova Skotio prezentis la Heredaĵan Foiron en la urbeto Truro. En tiu Foiro partoprenis 558 studantoj el 33 lernejoj. Ĝi komenciĝis per parado de eminentuloj kaj multaj studantoj, kiuj surhavis malmodernajn kostumojn kaj kostumojn kiuj reprezentis la diversajn devennaciojn de la studantoj kaj iliaj prauloj. La Aerarmea-Stacio ĉe Shearwater (apud Halifakso) partoprenis kaj sendis helikopteron, kiu flugis super la Komunuma Kolegio, kie okazis la Foiro, kaj surteriĝis apud la kolegio. Kompreneble, tio multe plaĉis al la geknaboj, kaj ĉirkaŭ 50 el ili povis eniri la helikopteron kaj rigardi ĉion interne de la aviadilo. La lernejestraro kaj kelkaj lokaj familioj ankaŭ gastigis 23 premiitojn de lernejoj en Shawville, Kebekio kaj Clarke's Beach, Novlando kaj Labradoro, kune kun kvar akompanantoj, dum unu semajno. Ili vizitis la vidindaĵojn de nia regiono kaj amikiĝis kun niaj studantoj kaj la gastigantaj familianoj. Oni disdonis al la gajnintoj de premioj 60 orajn grandajn medalojn sed la du gajnintoj kiuj faris la plej bonajn projektojn gajnis premion de unu senpaga semajnvizito al Montrealo.

Ĉar la ĉi-jara programo estis pli granda ol tiuj en pasintaj jaroj, oni decidis starigi la laborkunsidon nur unufoje en la Foirtago, posttagmeze. La Aerarmeo ankaŭ donis laborkunsidon kaj, kompreneble, tiu estis popularega kaj mi estis bonŝanca kiam ok lernantoj kaj unu patrino ĉeestis la Esperantan kunsidon.

Mi instruis tri kantojn, nome la alfabetan kanton „Ni kalkulu Kune” kaj „Ruĝa Pomo”. Mi parolis pri la avantaĝoj de la lernado de Esperanto kiel la unua fremda

lingvo, aŭ pont-lingvo por la aldona studo de fremdaj lingvoj; pri la Pasporta Servo; pri la Koresponda Servo; pri Esperanto en la Interreto; kaj mi montris diversajn infanajn librojn kiel *Winnie la Pu*, *Tinĉo*, *La Eta Princo*, *Asteriks*, ktp.

Iu knabo kun malĝoja mieno venis al la laborkunsido iomete malfrue kaj sidis ĉe la malantaŭo de la ĉambro. Ŝajnis al mi ke li tute ne deziris partopreni la esperantan kunsidon, sed li kantis la kantojn kaj, post la parolado kiam mi montris la librojn al la lernantoj, li demandis ĉu mi instruas Esperanton. Mi jesis kaj li petis, ke mi instruu lin; tamen, li loĝas en Nova Glasgovo, urbo for de mia vilaĝo, do, bedaŭrinde, mi devis nei lian peton. Mi donis al li la unuan lecionon de la 12-leciona poŝta kurso kiun mi kontrolas, sed mi diris ke, laŭ mia opinio, tiu kurso estus tro malfacila por lernanto de la sesa klaso. Sed mi miregis kiam li diris la esperantaj vortojn de la vortlisto en tiu leciono per sufiĉe bona prononcmankio kun nur iom da helpo de mi, kaj poste li penis traduki la unuajn kvin frazojn de la testo de tiu leciono – kiujn oni devas traduki de Esperanto en la anglan. Li sufiĉe bone tradukis la frazojn kaj mi preskaŭ svenis kiam li tradukis la sesan frazon – de la angla en Esperanton – senerare. Ho ve, se mi nur loĝus pli proksime al li! Li estas tia studanto pri kiu instruistoj povas nur sonĝi. Mi scias, ke la koresponda kurso estas tro malfacila por tia juna knabo, sed mi revas, ke iam en la frua estonteco mi renkontos almenaŭ unu instruiston kiu vere interesiĝas pri Esperanto. Se mi povus instrui Esperanton al instruisto, kiu instruus interne de la lerneja sistemo de Nova Skotio, eble tiam oni akceptus Esperanton kiel indan studobjekton, kaj mia provinco estus la unua en Kanado kiu oficiale instruus en la lernejoj la Internacian Lingvon.

— Kim Keeble

NIAJ LEGANTOJ REAGAS

Felicia Roman <felicia_roman@pcnet.ro>:

Jes, fakte mi regule legis vian interesan revueton; mi ĉiam ĝuas ĝin.

Preben Bagger <prebeno@pc.dk>:

Koran dankon pro la alsenditaj gazetoj! Mi daŭre trovas ĝin interesa kaj altkvalita. Preskaŭ nekredeble, ke temas pri kluba gazeto!

Ed Harler <famcker@juno.com>

Gratulojn pro nova rekordo! Estas tre surprize ke 18 jaroj forpasis tiel rapide. Eĉ pli surprize estas la fakto, ke ne mankas unu eldono dum la tuta tempo. Ĝi valoras la atentadon.

NOVA VORTAREGO EN ESTONIO

Dum telefona interparolo kun mia amiko Valev Kruusalu mi eksciis, ke en majo 2004 aperis en Tallinn 810-paĝa vortarego ESPERANTA-ESTONA. Oni ne bezonis multajn klarigajn vortojn koncerne ĉi tiun presfreŝan eldonaĵon – preskaŭ tuj mi decidis havigi ĝin. Post unu semajno estis jam eble palpi kaj foliumi la verkon hejme en Turku. Kun plezuro mi konstatis, ke ĝi estas fortike bindita kaj belaspekta kreaĵo. Sur la kovrilo legeblas *Esperanto-Eesti Sonaraamat* kaj la nomo de la aŭtoro Raimund Haabvere. La popoloj sur norda kaj suda bordoj de Finna Golfo estas parencaj kaj ĝuste pro tio la enhavo de tiu ĉi lingva gvidilo estas aparte interesa el vidpunkto de finnoj.

Tute hazarde mi komencis cerbumi pri la radiko *dank*, al kiu ligiĝas entute 30 esprimoj. Feliĉaj povas esti estonaj komencantoj. Jen ili havas fortan subtenon dum la studado. Ekzemple la konata en Parizo 1911 eldonita vortaro de Kabe havas nur 5 erojn sub la sama kapvorto. Setälä en Finnlando 1919 donas nur la radikon – do unu klarigan eron. J.C. Wells havas 1968 en Britio kvar erojn, la nova PIV en la jaro 2002 listigas 10 difinajn erojn. Novulo ĉiam helpemon sopiras. Raimund Haabvere (1909-1989) etendas sian manon kaj servos al estontaj komencantoj kaj progresintoj. Lia verko estas inda vojmontrilo kaj fonto por ĉerpi taŭgan materialon en ĉiutaga lingva praktikado.

La enpaĝigo estas farita plaĉe sur du kolumnoj. Nigre presitaj gvidlinioj helpas en la serĉado de vortoj, kiujn oni facile trovas. La teksto mesaĝas pri zorgeme kaj diligente plenumita laboro. Mian ĝojon spicis kelkaj larmetoj, kiujn mi dividis kun estonaj gefratoj pro sur la dua titolpaĝo dorspresite aperinta ‘okulpikilo’ : *raspubliko* – anstataŭ *respubliko*. Por eksterlandanoj iuj esencaj informoj pri la estona lingvo kaj pri ĝia fonetiko en la lingvo Esperanto estus estintaj utilaj, sed mi scias, ke ĉio ja estis verkita por estonoj. Tamen konata eldiro konstatas, ke oni povas kelkfoje kapti du muŝojn per unu frapeto.

Dum tristaj, pluvaj tagoj mi havis tempon ene ludi kun du estonaj vortaroj. Temas pri verkoj de Jaan Ojalo (*Eesti-Esperanto Sonaraamat* 1999) kaj de Raimund Haabvere. Ili ja formas nedisigeblan paron. Amuze estas trovi tiajn vortojn, kiuj aspektas al finnoj arkaikaj – kvazaŭ poeziaj kaj tiele iel tre belaj. Utero ŝajnas al mi latindevena fakvorto, sed estone ĝi estas *emakas* – do estas aludo al patrino (ema). Svede oni esprimas la koncepton pli ol bele – *livmoder* (patrino de vivo), sed la finna adekvata vorto *kohtu* neniel plaĉas al okuloj nek al oreloj laŭ mia opinio. Sendube finnoj, kiuj interesiĝas pri la estona lingvo, trovos grandan utilon en la luksa kaj freŝa produkto de Haabvere. Necesas kaj decas rekomendi ĝin varme kaj tutkore.

En la postparolo oni donas interesajn informojn pri ekestaj fazoj dum la preparado de la libro. Raimund Haabvere siatempe aktivis en la urbo Tartu, kie li gvidis kursojn kaj estis prezidanto de la loka klubo 1957-1979. Lia manuskripto estis preta jam antaŭ tridek jaroj. Tial ĉiuj facile komprenas, ke mankas ekzemple la vortoj *fakso* kaj *samizdato*, kiujn listigas kaj klarigas PIV 2002. Tio ja ne

fariĝas problemeto, ĉar supozeble esperantistoj utiligas plurajn vortarojn. Estis interese legi pri malfacilaĵoj, kiujn frontis la redakcia komisiono. Kiu scias la notitajn, malagrablajn faktojn, tiu vere profunde admiras kaj gratulas la agadon. Menciindas, ke subtenis la eldonadon finance Kulturministerio de la Estona Respubliko. Lingve kontribuis kaj helpis Instituto de Estona Lingvo. Evidentiĝas, ke Lembe Laanest havis ŝlosilan pozicion kunlaboran, ĉar la aŭtoro ne estis preta akcepti kiun ajn por redakta laboro. Temis dum multaj jaroj pri vera luktado, kiu ne ĉiam estis facila. Nun oni tamen finfine sukcesis kaj atingis la celon. Realiĝis la eldiro de Raimund Haabvere: „Mia vortaro aperos post mia morto.”

Laikan kaj nefakulan, sed sincere humilan gratulon subskribas Jorma Ahomäki el Finnlando.

INSTRUKCIOJ: KIEL PURIGI LA KLOZETAN PELVON

1. Metu supren la kovrilon kaj truseĝon, kaj aldonu okonon de taso de dorlotbesta ŝampuo al la akvo en la ekskrecia pelvo.
2. Alprenu la katon kaj kvietigu ĝin dum vi portas ĝin al la necesejo.
3. En unu glata movo, metu la katon en la ekskrecian pelvon kaj fermu la truseĝon kaj kovrilon. Povas esti, ke vi devos stari sur la kovrilon.
4. La kato mem agitos kaj faros abundan sapŝaŭmon. Ne maltrankviliĝu pro la bruoj el la pelvo; efektive la kato amuziĝas pri la afero.
5. Pelu akvon tra la pelvon tri-kvar foje. Tio provizas “pov-purigadon” kaj tralavon.
6. Zorgu, ke iu malfermas la antaŭan pordon de via hejmo. Estu certa, ke neniu troviĝas inter la necesejo kaj la antaŭa pordo.
7. Staru kiom eble plej fore malantaŭ la pelvo, kaj rapide levu la kovrilon kaj truseĝon.
8. La kato fulme ĵetiĝos el la pelvo kaj el la ĉambreto, kaj kuros eksteren kie ĝi sekigos sin.
9. Kaj la ekskrecia pelvo kaj la kato estos brilege puraj.

Sincere,

La Hundo